

August Heinrich Hoffmann,
Vespera kanto

tradukita de Manfred Retzlaff

Ree vesperiĝas
ĉie en la rond',
paco subeniĝas
kaj ripozas mond'.

Riveret' nur fluas
ĉe la roko jen,
kaj ĝi daŭre bruas
plu kaj plu sen ĝen'.

Ne vespero iu
endormigas ĝin,
sonoril' neniu
je la tago-fin'.

Mia koro, tia
estas ankaŭ vi!
Pacon trovos mia
koro nur en Di'.

*Traduko de la Germana poemo "Abendlied" de AUGUST HEINRICH HOFFMANN (Hoffmann von Fallersleben, *1798-04-02 – †1874-01-19) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04) en 2013-01-27.*

Arg-645-1943 (2014-01-28 23:29:57)

La melodio estas aŭdebla en <http://ingeb.org/Lieder/abendwir.html>.

August Heinrich Hoffmann,
Abendlied

tradukita de Manfred Ratislavo

Nun vesper' fariĝas
Ree tie ĉi,
Paco subeniĝas
Kaj ripozas ni.

Rivereto fluas
Ĉe la roko sen
Ĉeso kaj ĝi bruas
Plu kaj plue jen.

Sonoril' neniu
Ripozigas ĝin,
Ne dormigas iu
Ĝin je l' tagofin'.

Tia, mia koro,
Estas ankaŭ vi.
Donu, ho Sinjoro,
Pacon vi al ĝi.

*Traduko de la Germana poemo "Abendlied" de AUGUST HEINRICH HOFFMANN (Hoffmann von Fallersleben, *1798-04-02 – †1874-01-19) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04) en 2012-11.*

Arg-645-1378 (2012-11-27 18:34:25)

Vidu ankaŭ: [http://de.wikisource.org/wiki/Abendlied_\(Fallersleben\)](http://de.wikisource.org/wiki/Abendlied_(Fallersleben)). La muziknotoj troviĝas en http://www.lieder-archiv.de/abend_wird_es_wieder-notenblatt_300026.html, la melodio estas aŭdebla en <http://ingeb.org/Lieder/abendwir.html>.